# Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Majo : 5 2022

## POLLANDO KAJ LA EŬROPA KOMISIONO DENOVE EN PACAJ RILATOJ

La venontan 2-an de junio, la prezidanto de la Eŭropa Komisiono, S-ino Ursula von der Leyen, vizitos Pollandon. Verŝajne tiam, rilatoj inter ĉi tiu ŝtato kaj la Eŭropa Unio estos denove en paca stato, post monatoj da konfliktoj.



Mateusz Morawiecki, pola ĉef-ministro

Pasintjare, la Justica Kortumo de Eŭropaj Komunumoj postulis la tujan malfondiĝon de speciala jura ĉambro kreita en Pollando. Temas pri disciplin-truda ĉambro kiu rajtas puni juĝistojn, ĉefe pere de devigitaj translokigoj. La Eŭropunia Kortumo konsideris, ke la ekzisto de tiu speciala ĉambro povus influi sur la decidoj de juĝistoj en Pollando kaj eĉ realigi politikan gvidon al ili. Kompreneble, tiu situacio sendube damaĝus la devigan sendepedecon kaj senpartiecon de juĝistoj.

Krome, la pola registaro petis opinion al la Konstitucia Kortumo de tiu eŭropa ŝtato, rilate la efektivigon de juraj decidoj de la Eŭropa Kortumo. La Konstitucia Kortumo de Pollando respondis, ke la pola konstitucio troviĝas je supera pozicio ol la eŭropuniaj juĝoj, do ili povas esti ne-akceptataj de Pollando, se oni kontraŭas la polan superan leĝon.

Pro la ne-respektado de la juraj decidoj de Eŭropa Unio, Pollando riskis ricevi ekonomiajn monpunojn. Laŭ kalkuloj, tiu monpuno povus leviĝi al unu miliono da eŭroj ĉiutage. Cele al tiu deziro meti la rilatojn inter Eŭropa Unio kaj Pollando denove en pacan situacion, la Pola Dieto, aŭ parlamento, aprobis la pasintan semajnon leĝon, kiu nuligas tiun specialan disciplin-trudan juran instancon. Reage, la Eŭropa Komisiono malblokos la pagon de pli ol 36.000 milionoj da eŭroj al Pollando, por lukti kontraŭ la ekonomiaj sekvoj de la pandemio.

# *Vorto de la Semajno*

**Asekuri**: protekti kontraŭ riskoj, per unufoja aŭ perioda pagado de monsumo tiucela al asocio aŭ kompanio, kiu promesas kompenson por eventuala perdo, difekto, vundiĝo kaj simile.

**Asekuro**: kontrakto por asekuri.

**Asekuraĵo**: objekto, pro kies eventuala difektiĝo aŭ perdo oni devas ricevi kompenson.

**Asekurato**: persono, kovrita en asekura poliso.

**Asekuristo**: asekura agento, peranto aŭ kompanio.

**Reasekuri**: asekuri parton de la risko de asekura kompanio.

**Kontraŭasekuro de premiumoj**: vivasekuro, kiu garantias retropagon de la pagitaj premiumoj, se la asekurito mortis antaŭ la fino de la kontrakta daŭro.

**Kunasekuro**: asekuro, subskribita samtempe kaj sendepende inter si de pluraj asekuristoj, kiuj kune asekuras la tuton de la risko, ĉiu laŭ propra procento de la risko kaj de la premiumoj.

**Sinasekuro**: ago de organizaĵo ŝpari rezervan monon en fonduso, tiel ke eblos estonte mem pagi damaĝojn pri iu risko sen la bezono de asekuro.

**Asekurpreninto**: persono, kiu subskribis asekuran kontrakton kaj pagos la premiumon por ĝi.

**Premiumo**: Monsumo, difinita en la poliso kaj periode pagenda de la asekurato al la asekuranto.

Sinonimoj**:** *certigi, gardi.*